

Annecy, je la 25^a de Novembro 1927
R. 90

Bre honorata Sinjoro,

Vian ŝatindan Karton mi ricevis
antaŭ kelkaj tagoj samtempe kun
la multaj sendaĵoj. mi plej kore
dankas vin kaj ĉi kune mi sendas
al vi ian negravan artikolon, kiun
vi bonvolos presigi, se utile.

La senditajn kalendarojn de l' Aca-
demia pro Interlingua mi tralegis
kun viva intereso kaj, vere, mi miris
vidante kiom la novaj projektoj,
Casuela, Neoromano, k. a. similas
al la Zamenhofa sistemo. Dank'al
tion da penado kaj studado, Espe-
ranto certe evoluos kaj plibonigos
ĝam mi konstatas, ke malbelaj
vortoj fariĝas arkaj kaj cedas

la lokon al novaj pli internaciaj;
Karcero (malliberejoj), abunda (suficega),
sekureco (sendangereco), klostro (mona-
kejo), planto (kreskaĵo), solida (mal-
fluida), hospitalo (malsanulejoj), re-
zisti (kontraŭstari), fugi (forkuri)
Kaj multaj aliaj. La afero, laŭvere,
ne iras rapide, sed des pli bone; la
lingvo internacia estas ankoraŭ en
infana stato; ni do ne plenigu
tiuj malpacience ĝian junan stoma-
kon per tro da nutraĵo, kiun
ĝi ne povus digesti.

Kun alta estimo kaj rea danko,
samideane via,

Boucon
